

UEA KER-ekzameno
Nivelo C2

Tabelo 1. Komunaj referencniveloj: ĝenerala skalo

PROFESI-NIVELA	C2	Kapablas senpene kompreni preskaŭ ĉion aŭdatan aŭ legatan. Kapablas resumi informojn venintajn el diversaj parolaj aŭ skribaj fontoj, kapablas kohere reprodukti argumentojn kaj raportojn. Kapablas spontanee, tre flue kaj precize esprimi sin, distingi inter la plej etaj nuancoj de la signifoj, eĉ en kompleksaj situacioj.
	C1	Kapablas kompreni larĝan gamon da malfacilaj kaj longaj tekstoj, rekonas la implicajn signifojn. Kapablas flue kaj spontanee esprimi sin, ne tro montrante bezonon serĉi la esprimojn. Kapablas uzi la lingvon flekse kaj efike por sociaj, studaj kaj profesiaj celoj. Kapablas verki klaran, bone konstruitan, detalan tekston ankaŭ pri kompleksaj temoj, kaj dume kun certeco regas la organizajn, strukturadajn kaj koherigajn ilojn de la parolo.

<https://rm.coe.int/16806d8893> kaj <https://edukado.net/ekzamenoj/referenckadro/libro>

	Daŭro	Taskotipoj	Longeco	Poentoj
P a r o l a p a r t o	90 minutoj	Aŭskulta komprenado 1. jes / ne en 3-5 debateroj (1 aŭskulto) 2. informgrupigo laŭ dialogo (2 aŭskultoj) 3. resumo kaj asertpravigoj pri monologo (1 aŭskulto)	5-7 minutoj 7-10 minutoj ĉ. 20-25 minutoj	10 14 16 sume 40* <i>min. 16</i>
	20 minutoj	Parola produktado 1. alpublika parolado (post 20-minuta antaŭpreparo; elekteblo el du temoj) 2. interagado improvize laŭ la prezentita temo	6-8 minutoj 6-8 minutoj	sume 40** <i>min. 16</i>
Parola ekzameno (tipo 'P') sume				80
<i>Minimumo por sukcesi, sume: 48 poentoj.</i>				
S k r i	3,5 horoj	Lega komprenado 1. jes / ne : Ĉu la aserta enhavo laŭtekstas aŭ ne? 2. kompletigo el listo 3. plurelekta testo kun difinoj 4. C-testo	2.500-3.000 vortoj	10 10 10 10 sume 40 <i>min. 16</i>

b a p a r t o	Skriba produktado	150-200 vortoj	15
	1. oficiala letero reago, reklamacio, propono baze de skribaj dokumentoj	450-500 vortoj	25
	2. eseo, artikolo, recenzo esprimo de opinio, raporto al celpubliko a) pri temo kun 3 traktendaj aspektoj aŭ b) baze de du noveloj konigitaj je la aliĝo al la ekzameno		sume 40*** <i>min. 16</i>
Skriba ekzameno (tipo 'S') sume			80
<i>Minimumo por sukcesi, sume: 48 poentoj.</i>			

* Pritaksado de la 3-a tasko de la aŭskulta komprenado

Pritaksaj kriterioj por la 2a tasko:

1. Enhava fideleco, objektiveco	2
2. Transdono de senlakuna, facile sekvebla logiko de la prelego	1
3. Prezento de kelkaj ĉef-ideo(j) en sia komplekseco	3
4. Komplekseco kaj kohero tra la resumo: varienco, precizenco de kunligaj iloj por esprimi la ideo-rilatojn de la prelego	2
Sume	8 poentoj

** Pritaksado de la parola produktado:

1. alpublika parolado		2. intergado	
taksataj eroj	poentoj	taksataj eroj	poentoj
enhavo:	8	enhavo:	8
<ul style="list-style-type: none"> ● adekvata traktado de la temo ● logika strukturo ● riĉa argumentado ● laŭcela komunikado 		<ul style="list-style-type: none"> ● adekvata traktado de la temo ● logika strukturo ● kvalitaj reagoj ● laŭcela komunikado 	
tekstigo kaj prezento en ambaŭ taskoj kune:			24
<ul style="list-style-type: none"> ● leksika vasteco ● lingva ĝusteco ● kohero, sintakso ● flueco ● prononco, intonacio ● oratoraj kapabloj 			6 6 3 3 3 3
Sume: 2x8+24			40

** Pritaksado de la skriba produktado:

1. oficiala letero		2. eseo / artikolo / recenzo	
taksataj eroj	poentoj	taksataj eroj	poentoj
enhavo:	5	enhavo:	8
<ul style="list-style-type: none"> ● konformo al la taskopriskribo, longeco ● argumentado ● adaptiĝo al la adresito 		<ul style="list-style-type: none"> ● konformo al la taskopriskribo, longeco ● adaptiĝo al la celpubliko ● strukturigo, proporcioj ● originaleco, idea riĉeco 	
	10		17
tekstigo:		tekstigo:	
<ul style="list-style-type: none"> ● revortumo, kohero 	5	<ul style="list-style-type: none"> ● kohero, logiko, konsekvenco 	5
<ul style="list-style-type: none"> ● leksika vasteco 	2	<ul style="list-style-type: none"> ● leksika vasteco 	6
<ul style="list-style-type: none"> ● gramatika ĝusteco, komplekseco kaj varieco 	3	<ul style="list-style-type: none"> ● gramatika ĝusteco, komplekseco kaj varieco 	6
Sume	15	Sume	25